

Indikoj por fakuloj

En agrikulturo kaj florkultivado, laŭ iuj ajn stratoj, oni uzu kontraŭherbajn substancojn / herbicidon kombine kun aliaj metodoj.

Kontraŭherbaj substancoj « hormonoj » aŭ kontaktaj kontraŭherbiloj agas tre bone kontraŭ junaj plantoj de ambrozio. Post unua tranĉado la planto plukreskas. Dua tranĉado estas malmulte efika kontraŭ plukresdado de la planto ; tiam oni devas uzi kontraŭherbajn substancojn / herbicidon.

Laŭ la vojoj, sur placoj kaj en ĝardenoj oni ne devas uzi kontraŭherbajn substancojn por lukti kontraŭ la unusolajn plantojn.

Ne konfuzu ambrozion kun tiuj aliaj plantoj :

- Chenopodium album*
Folioj kun faruna aspekto, plurformaj, ovalaj, sagformaj.
- Amaranthus retroflexus*
Folioj spatelformaj aŭ ovoformaj, kun entranĉita pinto.
- Artemisia vulgaris*
Profunde disigitaj folioj kun suba parto blanka kotoneca

Informoj sur la Reto

- www.acw.admin.ch
- www.ambrosia.ch
- www.cps-skew.ch
- www.pollenundallergie.ch
- www.ragweed.eu



Post tranĉado aŭ eliminado pere de kontraŭherba substanco / herbicido la planto ambrozio povas doni novajn branĉetojn.

Atentu !



Surhavi ĉiam maskon kaj gantojn por elŝiri plantojn dum florado.

AMBROZIO MINACAS
SANON KAJ
BIODIVERSECON

(*Ambrosia artemisiifolia* L.)



Faldfolioj en franca lingvo, germana lingvo, angla lingvo
disponiblas ĉe Agroscope
Research station Agroscope Changins-Wädenswil ACW
Sinjoro Christian Bohren Pf 1012
CH- 1260 Nyon 1
Switzerland

www.acw.admin.ch



Schweizerische Eidgenossenschaft
Confédération suisse
Confederazione Svizzera
Confederaziun svizra

Swiss Confederation

Federal Department
of Economic Affairs DEA
Agroscope Changins-Wädenswil
Research Station ACW

Danĝero por la sano

10 ĝis 15 % de la homoj povas esti alergiaj al ambrozio. Ĝia poleno kaŭzas riniton / nazinflamon, konjunktiviton kaj en gravaj kazoj inflamajn malsanojn de la bronkoj aŭ eĉ astmokrizojn por 25% de la malrezistemaj personoj.

Ekonomiaj konsekvencoj

Laŭ unua taksado la jaraj kostoj pri kuracado por ĉiu paciento atingas 100 CHF por alergia persono, 1000 CHF por astmosuferanta persono, tio signifas por Svislando jaran koston de ĉirkaŭ 325 milionoj da CHF. Tiu kosto estas kalkulata laŭ nunaj eksperimentoj en eksterlando.

Poleno Po 76 milionoj ĝis unu miliardo da grajnoj sur ĉiu planto. Disvastiĝo sur pli ol 200km. Per la vento poleno flugas ege foren.
Semoj (2-4mm) Po 30 ĝis 3000 grajnoj sur ĉiu planto. Vivdaŭro : 40 jaroj
Ne okazas transporto pere de vento pro la pezo de la semoj.
Plantetoj Ĝermado ekde monato aprilo. Tre rapide ambrozio povas multiĝi kaj infesti.
Celo : forpreni plej multe da plantoj antaŭ la ekflorado por malebligi produktadon de poleno, de semoj kaj konsekvence de plantoj.



Ĉiuj devas kune lukti

En Svislando ambrozio ankoraŭ estas en komenca fazo. La kunaj klopodoj de la aŭtoritatoj, de la fakuloj kaj de privatuloj necesas por lukti efike kontraŭ tiu trudplanto.


Kion fari ?

- Kaze ke vi trovas 1 – 20 plantojn : Elŝiru ilin kaj forĵetu ilin al ordinara rubujo, kies enhavo estas forbruligota. Venontan jaron bone kontrolu la lokon.
- Neniam kompoŝtu ambroziajn plantojn !**
- Kaze ke vi trovas pli ol 20 plantojn : Tuj informu la urban aŭ vilaĝan administrejon ! La loko devas esti kontrolota dum pluraj jaroj.

Ĉiu-kaze informu la administrejon de la loko, kie vi trovis la plantaĉon.

Priskribo : « Ambrosia artemisifolia L. »

Ambrozio kun artemiziaj folioj estas unujara dumsomera planto origine el Nordameriko. Ĝia kresko forte dependas de la mediaj kondiĉoj (grundo, lumo, humideco). Ĝia grandeco varias de 30cm ĝis 150cm. Ĝiaj folioj nomitaj « pennatipartites » estas maldikaj kaj eltrancitaj, verdaj ambaŭflanke kun centra ripo. La ofte ruĝeca tigo estas kutime hara, fortika kun multaj branĉoj. Sur la sama planto oni observas virajn kaj inajn florojn malkune. Sur grundoj malriĉaj je nutraĵo la planto restas malgranda kaj produktas malmulte da semoj. Sur riĉaj grundoj ĝi povas fariĝi grandega kaj produkti grandajn kvantojn da poleno kaj da semoj. Ambrozio multiĝas nur tra siaj semoj. La plantoj ne eltenas froston.



Atentu poleno

Ripe grains fall straight to the ground.

Vegetada periodo :

Antaŭ la ekflorado (aprilo ĝis julio) oni elradiku la planton protektante siajn manojn pere de gantoj. Dum la florado oni uzu kaj gantojn kaj protektmaskon.

Aprilo

Majo

Junio

Julio

Augusto

Septembro

Octobro

Novembro

Kia minaco por la biodiverseco ?

Ambrozio estas ege trudema, invada. Ĝi rapide multiĝas ĉie, kie la grundo (tero, sablo, ŝtonetoj, gruzo) videblas surface. Ambrozio povas minaci la biodiversecon, ĉar ĝi konkurencas la aliajn plantojn.

Viraj floroj, kiuj produktas polenon



Kio disvastigas ambrozion ?

La miksitaj grajnoj por birdoj aŭ por etaj bestoj
Transporto de tero
Agrikulturaj maŝinoj kaj konstrumaŝinoj (koto)



Kie oni trovas ambrozion ?

En privataj kaj publikaj ĝardenoj kaj parkoj, laŭ la stratoj, laŭ fervojlinioj, en neflegitaj terenoj, en nekultivitaj kampoj / novaloj, en gruzejoj, en konstrulokoj, sur kompoŝtaj surfacoj kaj en kampoj.



Ina floro portanta semojn